DEPOT LEGAL

1re Année — Samedi 20 Mai 1905 — N° 7

5 Centimes — LA — 5 Centimoj

ALĜERIA STELO

L'ÉTOILE ALGÉRIENNE

Petit Organe de Propagande Espérantiste de l'Afrique du Nord

BI-MENSUEL ★★★ DUONMONATA

Prix de l'Abonnement annuel		Kosto de la Jara Abono	
Algérie, Tunisie	2 fr. »	Alĝerujo, Tunisujo	2 fr. »
France	2 fr. 50	Francujo	2 fr. 50
Etranger	3 fr. »	Eksterfrancaj landoj	3 fr. »

Les Annonces sont reçues à l'Administration du Journal, 57, rue d'Isly, ALGER. *Prix sur demande*

DIRECTEUR-FONDATEUR **Barthélemy BALS** ADMINISTRATEUR **Louis LANDES**

La Anoncoj estas ricevataj al la Administracio de la Jurnalo, 57, rue d'Isly, ALGER. *Prezoj laŭ peto*

Abonnés Protecteurs

Tout abonné au journal, qui nous procurera **cinq** abonnés nouveaux, sera inscrit comme ABONNÉ PROTECTEUR et son nom sera publié dans le journal, sauf avis contraire; en outre, **un sixiéme abonnement** sera servi **gratuitement** à l'adresse qui nous sera indiquée par l'abonné protecteur.

Toute personne faisant un don de **cinq francs** au minimum sera également inscrite comme ABONNÉ PROTECTEUR et un abonnement gratuit sera servi à l'adresse qui nous sera indiquée.

L'EXPOSITION ESPÉRANTISTE D'ALGER
ESPERANTA EKSPOZICIO EN ALĜER

SUITE ET FIN — SEKVO KAJ FINO

Une carte géographique des groupes de Belgique, et des correspondances de l'Amérique du Nord, du Pérou, de l'Uruguay et du Japon ; une collection de livres concernant l'Esperanto et le tourisme ; des spécimens de l'Esperanto appliqué aux aveugles par le système Braille. Une collection de correspondances donnant des détails sur la guerre russo-japonnaise ; des photographies de l'Exposition de Saint-Louis et du groupe de Saint-Omer.

Parmi les nombreuses brochures envoyées à l'Exposition d'Alger, nous avons remarqué un travail de M. Bignié, de Talence ; dans cette plaquette, M. Bignié compare d'abord, les langues Volapük avec le Bollak et l'Esperanto avec l'Adjuvanto ; ensuite, c'est un petit cours d'Esperanto qui consiste en exemples de mots classés par catégories et, enfin, quelques dessins montrant l'emploi des diverses prépositions. Ce travail nous montre que son auteur a approfondi l'étude de l'Esperanto, que c'est un travail-

Geografikan karton el la Belgaj grupoj, kaj kartajn korespondojn el Nordameriko, Peruo, Urugujo kaj Japanujo ; multajn librojn concernantajn Esperanton kaj turismon ; specimenojn de Esperanto por blinduloj skribitaj laŭ la Braille'a sistemo. Rilate al la milito Ruso-Japana, oni povis tralegi tre interesajn poŝkartojn kaj leterojn donantaj detale sciigojn pri ĝi ; fotographaĵojn el la Saint-Louis'a eksposicio, kaj el la Saint-Omer'a grupo.

Inter la numeraj broŝuroj senditaj al la Alĝera ekspozicio, ni rimarkis verkon de S-ro Bignié, el Talence ; en tiu verko, S-ro Bigié komparas, unue la lingvoj Volapük kun Bolak kaj Esperanto kun Adjuvanto ; due li donas malgrandan kurson esperantan, kiu konsistas el ekzemplaj vortoj enmetitaj kategorie, kaj kelkaj desegnaĵoj montrantaj la uzon de la diversaj prepozicioj Tiu laboro montras al ni ke lia aŭtoro estas tre sperta pri la lingvo Esperanto, kaj precipe tre laborema, serĉema kaj vera

leur, un chercheur et un vrai savant.

Nous finirons cette trop courte énumération en remerciant les groupes espérantistes pour leurs envois de documents à l'Exposition algérienne. Nous croyons, en cela, être les interprètes de tous les espérantistes algériens qui furent très heureux d'aller admirer, dans le hall du Palais Consulaire, les résultats étonnants obtenus par la langue Esperanto.

Nous devons également remercier tous les dévoués espérantistes qui ont participé à l'organisation de l'Exposition.

Nous espérons que l'Esperanto en retirera un très grand profit et que les ignorants ou les incrédules viendront à nous, de plus en plus nombreux, pour apprendre et diffuser ce merveilleux instrument international que créa le docteur Zamenhof.

LOUIS LANDES.

scienculo.

Ni finas tiun tro mallongan raporton dankante la grupojn kaj la samideanojn pro iliaj sendoj de dokumentoj al la alĝera Ekspozicio. Ni tion faras je la nomo de ĉiuj la alĝeriaj esperantistoj, kiuj estis tre feliĉaj admiri, ĉe la Ĉambrego de la Komerca Palaco, la mirindajn rezultatojn akiritajn de la lingvo Esperanto.

Ni same devas danki la fervorajn esperantistojn, kiujn'alportis ilian kunlaboradon por la organizo de la Ekspozicio.

Ni tre esperas, ke la lingvo Esperanto eltiros de tiu ĉi ekspozicio kiel eble plej multan profiton, kaj ke la nescienculoj aŭ nekredemuloj alvenos al ni pli kaj pli multaj por lerni kaj disvastigi tiun belan internacian ilon, kiun verkis doktoro Zamenhof.

LUDOVIKO LANDES.

ÉCHOS EĤOJ

CONFÉRENCE.

M. Aubert, secrétaire général du syndicat commercial a fait, le mois dernier, dans le Hall du Palais Consulaire, une très belle conférence dont la longueur ne nous permet malheureusement pas l'insertion dans ce journal.

Il a principalement combattu les arguments de M. Albin Rozet apportés à la Chambre des députés et a été très applaudi par tous les assistants.

A la fin de cette conférence, M. le docteur Bresson, président du groupe espérantiste d'Alger, remercia M. Castan, président de la Chambre de commerce, pour l'autorisation qu'il avait donnée d'installer l'exposition espérantiste dans le Hall du Palais Consulaire.

***

A M. ALBIN ROZET.

On lit dans le « Cicérone », organe du Groupe espérantiste de Boulogne-sur-Mer : « Mme Junck, de Bordighera, arrivera à Boulogne au mois de mai. Elle y donnera des leçons d'Italien, d'Allemand et d'**Esperanto** ! » Voilà qui est singulier. Une personne ayant à sa disposition une langue néo-latine et deux langues anglo-germaniques, qui a éprouvé le besoin d'apprendre l'Esperanto !

Qu'en pense le rapporteur de la quinzième Commission ?

***

PAROLADO.

S-ro Auber, generala sekretario de la komerca sindikato, faris, la lasta monato, en la Halo de la Komerca Palaco, tre belan paroladon kies, longeco bedaŭrinde malhelpas nin publikigi en nia ĵurnalo.

Li precipe parolis kaj kontraŭbatalis la paroladon de S-ro Albin Rozet ĉe la Deputata Ĉambro, kaj estis multe aplaŭdita de ĉiuj la ĉeestantoj.

En fino de tiu parolado, S-ro Bresson, prezidanto de la Nordafrika grupo, dankis S-ro Castan, prezidanto de la Komerca Ĉambro pro la permeso donita de li fari la esperantan ekspozicion en la Halo de la Komerca Palaco.

***

VERKO DE DOKTORO SAQUET.

Ĝis nun, pro manko da loko, ni malfruis paroli pri la sendo de tre interesan broŝureton de doctoro Saquet, prezidanto de la Nantes'a grupo. En tiu verko, doktoro Saquet publikas la rezultaton de kunveno de la Akademika Societo de Loire-Inférieure, kiu jesis Esperanton kiel internacia lingvo, kaj nomis doktoro Saquet delegato.

***

AL NIAJ KUNFRATOJ.

Ni dankas niajn fremdajn kunfratojn, kiuj bonvolis paroli pri la eliro ne nia ĵurnalo, kaj precipe la germanan revuon « Germana Esperantisto », kiu publikis longan kaj amindan artikolon pri la « Alĝeria Stelo ».

ESPERO.

TIMGAD

SEKVO

En la urban mezon, oni aliras al FORUM, kie oni trovis piedestalojn de multaj statuoj kaj, sur la platŝtonaro, postsignoj de la lokoj kie staris la rajdistaj statuoj.

Sur la rando de FORUM, suprenirinte nescie sur tion, kio estis la alparolada tribuno, oni fronte vidas la kolonojn de CURIA, konsilantara ĉambrego de la « decuriones », tiamaj urbaj « konsilantoj ». Sub la « rubaro » de tiu ĉambrego oni eltrovis statuon de CONCORDIA : kredeble, la « konsilantaro » sub la influo de tia deino, faris kunsidojn speciale kvietajn ! Dekstre belajn kolonojn oni restarigis. Sur FORUM apogiĝas butikoj, kelkaj kun postbutikoj, kies enirejo estas en la granda vojo « decumanus », kiu alkondukas al la triumfa pordego konstruita por honorigi Traĵanon, kaj staranta ĉe la komenco de la vojo de Lambeso al Thevesto. Sur tiu vojo oni rimarkas postsignojn faritajn de la traveturintaj antikvaj veturiloj.

La arĥitekturo de la triumfa arkaĵo enhavanta unu ĉefan, kaj du flankajn pordojn, montras, ke tiun monumenton oni faris dum iom malfrua epoko de la imperia tempo, ĥaŭ la kleruloj, dum la mezo de la dua centjaro. Interesinde estas vidi la kontruaĵon ambaŭflanke, tial ni donas partan vidaĵon



GRANDA VOJO « DECUMANUS »

de la ekstera flanko, en kiu oni rimarkas, en unu en ĝia niĉo, statuon tie starigitan de preskaŭ dek ok centjaroj.

Antaŭ ol alveni al la triumfa pordego, oni renkontas maldekstre la muroj de domo kun ĝia antaŭa « atrium ». Tiu ruinego, kelke da tempo antaŭ, estis ankoraŭ speciale rimarkinda, ĉar la ĝis tiamaj elfosadoj nur estis aperigintaj — preskaŭ ekskluzive — publikajn monumentojn.

Preter la triumfa arkaĵo, oni vidas la sanktejon de la Timgada Genio ; el ĝi granda parto ĝis nun restadis. Cetere, multenombraj ŝajnas esti la religiaj konstruaĵoj en Timgado.

Du altajn kolonojn restarigis, en la ruinaro de la sanktejo de « Jupiter », la franca Administracio. Tiu restarigo montras la amplekson de la konstruaĵo. La skalon de la alteco de tiuj kolonoj sciigas la turisto apude staranta kaj ilian diametron, S-ro Rottier, inspektoro de la laboradoj, haltinta proksime renversita fondamento de kolono.

Ne malproksime de « Capitolium » oni vidas bazaron ; tiu konstruaĵo kun ĝia antaŭa kolonaro estas ankoraŭ en tre bona stato ; ni donos el ĝi partan vidaĵon.

Pro la malvasteco de la spaco, la vendistoj devis iri en iliajn butikojn transpasante sub la ŝtonaj tabloj, kiuj portis ilian komercaĵaron. Eĉ hodiaŭ, en Tunizo, estas bazaroj same aranĝitaj.

Reirante al FORUM oni renkontas « thermi » (vaporbaneĵon). Kelkaj banejoj estas en la urbo, ĉu por la virinoj, ĉu por la viroj. Iliaj subaj konstruaĵoj, estas tre bone konservitaj. Sur la desegnaĵo oni vidas lokon de ĉiuj koloneto j faritaj je kavaj brikoj kaj portantaj la vaporejon (sudarium) kuŝantan supre la subvaporejo (hypocaustum).

(Daŭrigota). Traduko de Esperantisto.

★ NIA ALĜERIA PAĜO ★

La Conŝtantin'a Valo

SEKVO KAJ FINO

Ni unue vizitas la nordan parton de l' valo. Ni malsupreniras kelkan ŝtuparon malluman kaj trairantaj feran ponteton ni alvenas sub grandegan naturan ŝtonegan arkaĵon. La artefarita vojeto sur kiu ni staras, estas tiel alkroĉita kontraŭ la ŝtonega muro kiel hirundaj nestoj kontraŭ domaj murojn. Mirinda estas la vidaĵo kaj terure grandega. Jam ekpaliĝis la suna rebrilo kaj griza lumo lumigas al ŝtonaj muroj. Ĉio eksilentiĝas. Nur kelkaj korvaj birdoj ekkrias kaj de alta arkaĵo akvo bruetanta falas en la rivero, kiu sube rapide fluas. Niaj paŝoj kaj niaj voĉoj resonas de la eĥo repetataj.

Ni el arkaĵo eliras. Tiam la blua ĉielo reaperas kaj la suno ekbrilas klariganta orbrilaĵetojn en la akvo kiu falas de altaj ŝtonegoj. Ankoraŭ ni trairas novan kaj allegan majestan arkaĵon kaj poste alvenas ĝis la mirindaj akvofaloj tra kiuj la « Rhummel'o » ĵetis sin kun tondra bruego.

La horizonto nun pli larĝiĝas kaj ni admiras la belan pejzaĵon kiu malvolviĝas aŭtaŭ niaj okuloj. La « Rhummel'o » ellasata el siaj ŝtonegaj faŭkoj tra la kamparo forkuras kiel malliberulo foriranta el malliberejo.

Mirege impresitaj de tiel belega vidaĵo ni revenas saman vojon por viziti la sudan parton de l' valo.

Tie ni ne trairas subterajn arkaĵojn sed, promenantaj ankoraŭ sur artefarita vojeto, ni vidas supren la bluan ĉielon kaj la domojn de l'urbo tiel kliniĝantajn sur la valo kiel scivolajn personojn ekrigardantajn de tre alta balkono kaj ĉiam la « Rhummel'o » inter ŝtonegoj malvastigata suben rapide fluas.

En tiu ĉi parto de la profundegaĵo oni trovis varman fonton kaj konstruis oportunajn kaj agrablajn banejojn.

Ni fine alvenas kontraŭ la ŝtonegon « Sidi Rached » kaj miregitaj revenas domen.

P. DIFFRE.

Amuzaĵoj

SOLVOJ DE NIA LASTA NUMERO PROBLEMOJ :

UNUA PROBLEMO : ZONO / RE / REZONO

DUA PROBLEMO : MI / LITO / MILITO

TRIA PROBLEMO : A D O / D E K / O K O

KVARA PROBLEMO : Por kovri sian kapon.

A. BAISSAC.

Niaj Vizitantoj.

Dum la lasta monato, ni ricevis la sekvantajn ĵurnalojn aŭ revuojn :

LINGVO INTERNACIA (duonmonata), 33, rue Lacépède, Paris (Francujo).
L'ESPERANTISTE, 4, rue du Gril, Louviers (Francujo).
BELGA SONORILO, S-ro Vandersleyen, 31, rue des Patriotes, Bruxelles (Belgujo).
SVISA ESPERO, S-ro Th. Renard, 6, Vieux-Collège, Genève (Svisujo).
SUNO HISPANA, Corona, 5, Valencia (Hispanujo).
GERMANA ESPERANTISTO, 95, Prinzentrasse, Berlin S. (Germanujo).
CESKY ESPERANTISTA, S-ro Cejka, Bistryce-Hostyn, Moravio, (Austrujo).
MEKSIKA LUMTURO, S-ro D-ro Vargas, S-ta Rosa Necoxtla, (Meksiko).
BRITISH ESPERANTIST, S-ro H. Clegg, 14, Norfolk-Street, Strand, London.
JUNA ESPERANTISTO, 9, rue des Vollandes, Genève, (Svisujo).
ESPERO DE KATALUNJO, S-ro Bertelot, Céret (Pyr.-Orientales), Francujo.
ESPERO KATOLIKA, S-ro Em. Pelletier, Cheillé (Indre-et-Loire), Francujo.

RECHERCHES dans tous les pays de généalogies, documents historiques et biographiques, titres nobiliaires, armoiries. ordres de chevalerie, distinctions, etc. *Informations,* **C. MULKAY,** 16, rue des Minimes, *Bruxelles* (Belgique). Reçoit sans frais commons, annonces, abonnements à *La Alĝeria Stelo.*

RÉPARATION D'APPAREILS PHOTOGRAPHIQUES EN TOUS GENRES
Bon Fonctionnement Garanti
S'adresser à M. LANDES, imprimerie du journal, 57, rue d'Isly, Alger, ou 79, rue Michelet, Mustapha (sous-sol).

Le Gérant : MICHEL LLEDO. Alger. — Imp. J. TORRENT, 57, rue d'Isly.
Lettres accentuées de la Maison TURLOT, CHAIX et Cie, 128, rue de Rennes, Paris

Tirage 5000

Michel Lledo